

# PENSEO

*N-ro 229*

*nov. / 2010*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## PETAR PRERADOVIĆ

(1818-1872)

### LA MARO

Maro bela, maro dia,  
ĉie vi, la idilia,  
kiel la destin'!  
Al iu lulil' vi estas,  
al iu la fin'.

Ĉiel' ĉie, ĉiel' ardas,  
ĉiel' kie ni rigardas,  
en marvasta pel',  
sur ĝi blankaj papilioj  
ie-tie vel'.

Kiam vent' sur vi promenas  
kaj koleraj ondoj venas  
furiozas duŝ',  
centkapa vi 'stas leono  
via fundo - buŝ'.

Vi respondas per blekego  
homojn regas la timego  
dum via brueg',  
horor' sekvas la ondadon  
la puŝojn fulmeg'.

## GRIGOR VITEZ (1911-1966)

### MINISTO KAJ LA MARO

Kie ŝutiĝis ond' kristala  
Al rif'; arĝenta krias dist',  
La mevo kriĉas en golfo pala

Al mar' alvenis la minist'.

Tra lia orel' resonas vaga  
Bruo el la mineja fund'  
Okuloj blindas en lumo taga  
Pro nigra karbo el profund'.

En suna flanko etendas manojn  
La nigra fosanto kun karba flaro  
Rigardas forojn. Aŭskultas sonojn  
Okulojn liajn banas la maro.

*Tradukis el la kroata:*



**Josip Pleadin (Kroatio)**



## Mikaelo Bronsxtejn



**(Rusujo)**

*Finaŭguste mi ĝuis partoprenon en  
la Itala Esperanto-Kongreso en Linjano.*

*Tiu semajno donacis al mi multajn agrablajn  
kaj neforgeseblajn impresojn, kiuj iom post  
iom transformiĝas en la poemojn. Jen estas  
unu el la jam pretaj:*

### Pasta

Tage kaj vespere al restoracio  
iras ni por manĝi kun fiero scio,  
ke la plado nepre, faste kaj malfaste,  
estos ja sendube senevita *pasta*.

Kio estas *pasta*? Ĉio estas *pasta*!  
De la tag' unua ĝis la tago lasta  
al makaronioj, kukoj kaj nudeloj  
nun stomakoj niaj estas plenfidelaj.

Parmezan' raspita, saŭco melongena,  
fiŝoj kaj viandoj – ĉio tre bonvena  
ĉe la ĉefa plado grava kaj bombasta,  
en la kompilado kun reganta *pasta*.

Ĉiopova pasta, la nutraĵo drasta!  
Svarmas sinjorinoj kun la haŭt' elasta,  
mamoj reliefaj, ventroj sate ŝvitaj,  
kaj puĝetoj pufaj, ege apetitaj.

Eĉ la sun' ĉi tie ŝajnas nun pli vasta,  
pro l' efik' magia de la sorĉa *pasta*!  
Floroj odoregas, fruktoj sukoplenas, -  
eble ĉion tion same *pasta* benas...

Edenece logas ĝis la lipomordo  
pompaj nudaj korpoj ĉe la mara  
bordo.

Ĉu pensado mia povas resti ĉasta?  
Pelas ondo ondon: *pasta, pasta,*  
*pasta!*

23.08.2010

## Carlos Drummond (1902-1987)

### Pluvoza afero

Agace pluvo min igis anksia  
ĝis mi malkovris: pluv' estas Maria!  
Maria pluvis gute tie, ĉie  
trempante la dimanĉon ĝisebrie.

Miajn ostojn mokris, ŝi lasis min  
kiel teron pluvpluge for sen fin'.  
Mi senverda iĝis, iĝis tutkota...  
Maria pluvoplene eghipnota!

Sur min ŝi pluvis, sur ĉiun geston,  
penson, deziron, sonĝon kaj la reston.

Pluvetpluvis ŝi ade, pluvis dike,  
kaj tage, kaj nokte, ĉiam... apike!

Min ne pluvu, Maria, pli ol limo  
de tujpluveto: pluv' apenaŭ timo.  
Ne min inundu per via likv' plasma,  
ne estu akvul' tia kataplasma!

Vane tion mi diris... ĉar Maria  
al petoj spite pluvis aluvia.  
Kaj senkompate en duŝa rutino  
mian vojon banis en trista vino,

kiu ne varmigas tial ke pluveroj  
el cindro mostas, kaj ne el vinberoj.  
Pluvadema Maria, pluvadaĉa,  
pluviĝinta, fipluva, pluvoplaĉa!

Mi kriis: Haltu! kaj ŝi daŭre pluve  
frostajn flakojn teksis el memefluve.  
Tiom Maria pluvis miadome,  
ke la torento kreskis pli ol home,

kaj river', aŭ mar', io kun profund'  
formis sin por mi, mi iris ĝis fund'.  
Kaj kiom pli min ondoj portis for  
Maria pli fontumis, ĝis furor',

kaŭzante, ke, sen multo, por eliro  
l' aferoj simple iris laŭ kirliro,  
kaj l' mondo jen humida, en sorbiĝo,  
sub perverse fatala pluvporiĝo.

Plej strangaj uloj laŭamasigadis  
en sama past' akvoza, kaj klamadis  
kontraŭ tiu stulta pluv', pluv' sen fin',  
en disfal', kvazaŭdiluva (pluvin'!)  
Kantikoj porhaltigaj laŭtis ĉie,  
sed ho! des pli deliras akvo plie,  
kaj Maria, senbrideksploda krano,  
pli dilatiĝas en sia emano.

Ŝipoj sinkadas. La kvin kontinentoj  
jam subakviĝas kun ĉiuj la gentoj,

kaj Maria: je pluv'. Por ekvibr'  
de fluidvanua homa tutfibr',

de l' ter' senforta antaŭ l' pluvatenc',  
la Dia kortuŝiĝis Providenc',  
kaj Di' kompatreagis per nur kri':  
P l u v ê e s u M a r i a ! - Kaj ĉesis ŝi.



esperantigis

**Wel (Brazilo)**



**Anna Karlik (Hungarujo)**



**Milda Konfeso**

Detempe scias  
jam la tuta mond':  
sekreto mia  
valoras pli, ol  
brila diamant'...

Kvankam trezorojn  
ne plej konvenas  
kolekti sur l' Ter',  
mi konfesas en  
ĉi tiu leter':

Tiun belegan  
propran, animan,  
ĉiam validan,  
la dorlotatan  
kaj ununuran,

mian, trovitan,  
mi iam, tiam,  
ne gravas, kiam,  
kunportos tamen  
suben de la ter'!

**Mi estas kulpa**

Ja simpla virino  
kvankam mi nur estis,  
mian homan koron  
dia am' ekregis.

Kutimas okazi  
tiaĵ' unuoble,  
daŭras ĝi tamen  
jam tuta vivlonge.

Mi ekkonis foje  
lin antaŭ kvin jaroj,  
tiam okazante  
pedagog'aj tagoj.

Vane ĝi estas jam  
plejeble pura am',  
eksonis en iu  
la timiga alarm'.

Vekiĝis per tio  
"Verdokula Monstro",  
(ĵaluzon ne venkus  
eĉ plej bona pastro!)

Estas kompreneble,  
Ŝi, ho, kompatinde,  
ofendiĝis ege,  
vere, bedaŭrinde!

Miaj versoj, sentoj  
jes, ja ofendis ŝin...  
Mi petas vin, provu  
iel pardonon min!

**Erzsébet Tuboly (Hungarujo)**



**Hajkoj pri junia vetero**

Junia frosto  
Triste tremas la plantoj  
Suno sin kaŝas


Tridekkvar gradoj  
Svenas plantoj, la natur'  
Pluvon sopiras

Pluvas, pluvegas  
Jen ĉielaj kanaloj  
Elverŝas akvon

Pluvas, pluvegas  
La vento furiozas  
Arbojn kuŝigas

Pluvas, pluvegas  
Ŝtonoj en akvon dronas  
Etas la homo

Pluvas, pluvegas  
Inundo ĉion kovras  
Sunon ni sopiras



## Ferenc Jáki (1919-2010)



Aŭtunaj matenfloroj



## Helena Tylińska (Italujo)



Ventorozo

Blovas la vento  
el okcidento,  
portas nubon kun pluvo.  
Blovas vent' norda,  
elfjorda,  
portas neĝan kovrilon.  
Blovas la vento  
el oriento,  
kaj kunportas incenson.  
Blovas vent' suda,  
dezerta  
kun lamento infana,  
ĉar mortis patrino  
...kaj infano senpana...  
Blovas la vento el okcidento.  
Blovas vent' norda, elfjorda.  
Blovas la vento el oriento.  
Blovas la suda kun lamento.

Kun suno glori,  
Kun sun' deflori,  
Vivi dum tago,  
Vespere morti,  
Kaliko ĝermas,  
Kalik' sin fermas,  
Ne konas nokton,  
Tage prosperas.  
Simbolo: jen mi  
Tiel atendi  
Devas la finon:  
La sunsubiron.  
Flamu nur vivo  
Mia en brilo,  
Blinde ne vagi,  
En nokta ravino.

*esperantigis*

**VICI László**

**(Hungarujo)**



## István Vas (1910--1991)

Kiam la rozoj ekodoris

Ĉu vi memoras? kiam rozoj ekodoris  
ne plu estis ni jam junaj –  
la domon tombokrucoj ĉirkaŭfloris;  
en kor' mortintoj kunaj.

Ni sciis: nur ŝtelaĵo la feliĉo,  
kvankam edzo kaj edzino  
rigardas, kiel pompas la rozuja riĉo,  
ame en animo.

Griziĝis multaj viaj haroj tiujare –  
memoru! kaŭzoj gregis.  
Sed kiu restis nigra, tiu malavare  
pli ol iam brilegis.  
Al vi en la okulojn, ĉi spegulojn de admiro  
rompitajn lumojn kaŝis la teruro,  
kaj konfuziĝis tie la purverda brilo,  
sed pli dolĉis ĉi nebulo.

Matene ni vekiĝis kun jubilego pia,  
vi pro l' ĝarden', mi pro vi –,  
kaŝiĝis milde dum tiu somero nia  
Anglio, Veneci'.

Kiel aldonon strangan, danĝeran foran foron  
la morgaŭon ni suspektis –  
tiusomere estis: al vi en la koron  
la vintra vent' sin plektis.

Antaŭe estis por ni pli gajaj someroj,  
memoru! sed bela ĉi solis.  
En la ĝardenon klinis sin la mutaj tombejoj,  
kiam la rozoj ekodoris.

*Esperantigis*



**Imre Szabó**  
**(Hungarujo)**



## Ĉineske

*Yumeiren (Belulino Yu)*

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun  
po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9;  
silaboj kun para rimo.*

**Cindy Mckee (Usono)**



Oktobra ŝtormo

Per vento de decembro  
en basa tembro  
la vintro esprimiĝas.  
Al oktobro ĝi proksimiĝas.

Gajaj folioj flirtaj  
momente hirtaj  
kvazaŭ timplena arbo—  
tondita unuopa garbo.



**Veĵdo (Ĉinio)**



Cembro en vintro

jam en frosta decembro  
la norda cembro

des pli junverda iĝas  
pro fridrezisto ĝi prestiĝas

ĝi sin en vento flirta  
tenas bonvirta  
ŝmirita per neĝ-farbo  
ĝi restas nefleksebla arbo



**Cindy Mckee (Usono)**

## Frua frosto

Seniĝas nun novembro  
kiel jarmembro.  
Mi treme ektimiĝas  
al frosto ni jam viktimiĝas.

Nun bravas nur la mirto  
en verda virto.  
Desperas eĉ la barbo  
de sur la dando, ruĝ-rabarbo.

**Vejdo (Ĉinio)**

## Templo sur monto

sur monto staras templo—  
budha ekzemplo  
mi oferon dediĉas  
sincera koro jam sufiĉas

blovas la vento milda  
al templo bilda  
kaj majesta sur l' alpo  
karesas ĝin per softa palpo



**Eto (Ĉinio)**

## Decembra vintro

la vintro en decembro  
jame kun tembro  
trista venta fariĝas  
la monteĝoj blanke negliĝas

bestoj en loko ŝilda  
kun ronko milda  
jam kalvas bruna arbo  
ekmutas la rivera harpo

**Cindy Mckee (Usono)**

## Ĉekamena kontemplo

Ĉekamena kontemplo  
Sur monto, rododendro,  
en domo, fendro.  
Ekzisti memsufiĉe,  
Ekzisti labile kondiĉe.

Fenestre estis birdo.  
De ĉambra mildo  
notis homa hazardo  
inter la glacio kaj ardo.



## Lily (Ĉinio)

### Interŝanĝado de edzinoj

—laŭ ĉineska skemo Pusaman\*

mi kaj l' edzo laŭ invit'  
iris al bal' kun ekscit'  
en hal' malhela  
etos' pelmela

jen paro post par'  
ekdancis sen bar'  
laŭ flua muzik'  
en ton' de lirik'

l' edzo ĉirkaŭprenis min  
fole dancis kun kapklin'  
tiel ebrie  
kiel pasie

ĉe mia orel'  
per ton' miela  
li flustris, "kara,  
fraŭlin' najbara

jen edzin' de l' amiko.  
en sekvanta muziko  
mi dancu kun ŝi,  
prezentu al vi

sian edzon jen  
kun energiplen'  
ĝentilan, ŝikan  
sane fortikan."

mi respondis konsente  
ĉar ŝanĝos evidente  
li ja per manovr'  
edzinon per kovr'

muzik' reekis  
dancadon vekis

aliris al mi  
komplezeme li

aliris al sia sin'  
li intime kun obstin'  
mi sentis vere  
malpion pere

pro nia korpglu'  
eĉ lia spirflu'  
bloviĝis al vang'  
mia el la lang'

li anhelis senbride  
batis la kor' rapide  
pro kares' de mam'  
softa mia jam

sub la pantalon'  
kvazaŭ laŭ ordon'  
erektis la kac'  
kun granda aŭdac'

tio tiklas min tente  
mi sentis ĝin frekvente  
la piĉ' sendube  
malsekis sube

pliiĝis ekscit'  
al tuja koit'  
kvazaŭ fajra brul'  
ardis en ventlul'

kiseton al mia vang'  
li donis dum danca tang'  
diris balbute  
li postminute

"mi volas vere,  
kaj vi prefere?"  
"ne, mi perfidas  
se mi avidas."

"via edz' jam konsentas

ke aprobe silentas  
vi kun volonto  
sen ajna honto.

via edzo nun  
eble en mallum'  
kun mia edzin'  
en ĝoja fascin'."

li tiris min per forto  
al pli amuza sporto  
post hala kurten'  
li agis sen ĝen'

li senvestis min  
nure ĝis bikin'  
kuŝigis min jam  
sur mola tatam'

li lertis en lekado  
lia lang' en nomado  
iris de l' kolo  
ĝis maleolo

mia ja sen ĉes'  
sub langa kares'  
mi ardis jame  
trakorpe flame

li al mi montris dikan  
lian kacon fortikan  
brilan kun sango  
duran sen tango

mi kriis ĝeme  
tordis treme  
mi veis pete  
jam malkviete

li deŝiris subite  
la bikinon ekscite  
jam senĝentile  
eĉ malhumile

li violente  
jen ĉimomente  
ŝovis plenforte  
kacon komforte

li piŝtis fojrefoje  
ĝemkriis laŭte ĝoje  
ŝpruca varma flu'  
puŝis nin al ĝu'

kolapsis tuj li  
pasis la pasi'  
ja kia frenez'  
je mia aprez'

mian edzon renkontis  
mi kaj ankore hontis  
tamen trankvile  
li fajfis trile

jame kontente  
ĝuis senpente  
kun lia edzin'  
en gea kulmin'



*\*Pusaman (budhista dancisto): ĉina fiksfirma  
poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5;  
/ 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

## Niuniu (Ĉinio)

# Impreso pri aŭtuno

—laŭ ĉineska skemo Shaonianyou\*  
en mara pens' profunda  
mankas la bunta  
riĉa kolor'  
de printempa



la ter' fekunda

sur la ĉielo blua

mankas hirunda

ĉirpa kverad'

kaj fulma frap'

kun tondr' mult-runda

en la kanto aŭtuna

la forto suna

feblas plie

ne videblas

la vivo juna

ĉio volviĝas svage

per gazo bruna

tuj forpasos

la pejzaĝo

vivanta kuna

*\*Shaonianyou (ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimarango a,a,xxa / xa,xxa (x= senrima)*

## Veĵdo (Ĉinio)

# Funebre pri s-ro Long Lu\*

—laŭ ĉineska skemo Caisangzi\*\*

ve, nin forlasis nia  
frato Long Lu  
sen spur', sen bru'  
perdiĝinte en tempflu'

ni ja ne forgesos pri  
viaj konstru'  
kaj kontribu'  
al l' E-movado sen sku'



s-ro Long Lu

*\*Kiel ordinara membro de Chongqing-a Esperanto-Asocio, sinjoro faris banalajn aferojn por nia afero, kiuj indas nian memorigon. La 12-an de oktobro de 2010, li forpasis pro pulma kancero.*

*\*\*Caisangz (moruskolektanta knabino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimarango de xa, a,a. (x=senrima)*

## Maupassant (1850-1893)



Surmare

Al Henriko Céard

Lastatempe oni legis en la gazetoj la sekvantajn frazojn :

« BULONJO ĈE MARO, je la 22a de januaro. – Oni skribas al ni :

« Forloga malfeliĉo ĵus estigis la konsternegon meze de nia mara loĝantaro, kiu estis dum tiuj du lastaj jaroj tiom multe afliktita. La fiŝista ŝipo estrita de la ŝipmastro Kloro, enirante en la havenon, estis aljetita al uesto, kaj venis frakasiĝi kontraŭ la rokoj de la ondorompilo de la ĝeto. »

« Malgraŭ la klopodoj de la savŝipo, kaj la ŝnuroj pafsenditaj per la ŝnureljetilo, kvar ŝipanoj kaj la sipknabo pereis.

« La aĉa vetero daŭras. Oni timas novajn akcidentojn. »

Kiu estis la ŝipmastro Kloro? Ĉu li estis la frato de la unubrakulo?

Se la kompadinda viro, ruladita de la ondo, kaj mortinta eble sub la disrompitaĵoj de sia dispecigita ŝipo, estis tiu pri kiu mi pensas, li jam ĉeestis, jen nun ĉirkaŭ dek ok jarojn, al alia dramo, terura kaj simpla, tiel estas ĉiam ĉiuj forlogaj dramoj de la maro.

En tiu tempo la unuenaskita Kloro estis la ŝipmastro de trolŝipo.

La trolŝipo estas la tipa fiŝista ŝipo. Solida, ĝi ne timas ian veteron, kun ĝia ronda ventro, ĝi estas senĉese ruladata de la ondegoj kiel korko, ĉiam super la ondo, ĉiam vipata de la salaj kaj akraj ventoj de la manika Kanalo, ĝi laboras la maron, nelacigebla, kun la velo ŝveligata, kuntrenante flanke grandan fiŝkaptatan reton, kiu skrapas la marfundon, malkroĉas kaj rikoltas ĉiujn dormemajn bestojn en la ŝtonoj, la platajn fiŝojn kusantajn sur la sablo, la dikajn krabojn kun hokaj piedoj, la omarojn kun pintaj lipharoj.

Kiam la brizo estas malvarmeta, kaj la hulo kvieta, la ŝipo ekfiŝkaptas. Ĝia retego estas fiksita tutlonge de granda stango el ligno garnita per fero, kiun ĝi lasas malsupreniri per du kabloj, kiuj glitas sur du bobenegoj ĉe la ekstremo de la boato. Kaj la ŝipo, drivante laŭ la vento kaj la fluo, kuntrenas malantaŭ si tiun aparaton, kiu difektas kaj ruinigas la margrundon.

Surŝipe, kun Kloro estis liaduenaskita frato, kvar ŝipanoj kaj unu ŝipknabo. Kiam ili eliris el la haveno de Bolonjo, la bela hela vetero estis favora por la trolado.

Sed, baldaŭ ekblovis la vento, kaj neatendita burasko devigis la trolŝipon al la forflugado. Ĝi sin direktis al la anglaj marbordoj; sed la movata maro batadis la klifojn, elĵetiĝis kontraŭ la tero, kaj nebligis la eniron en la havenojn. La ŝipeto reiris al la marvastto, kaj revenis al la francaj marbordoj. La ŝtormo daŭris, kaj igis la ĝetojn netranspaseblaj, envolvante per ŝaumo, bruego, kaj danĝero ĉiujn alirojn al la rifuĝejoj.

Denove la trolŝipo reiris al la marvastto, kurante sur la ondodorso, balancata, skuata, ŝvitanta de akvo, balaata per akvamasoj, sed tamen fortika, kutimiĝinta al tiuj veteraĉoj, kiuj iafoje devigis ĝin, vagi dum kvin aŭ ses tagoj inter ambaŭ najbaraj landoj, ne povante alboridiĝi ajna haveno.

Poste fine la ŝtormo kalmiĝis, dum ĝi troviĝis marmeze, kaj kvankam la hulo estis

ankoraŭ malkvieta, la ŝipestro komandis ĵeti la trolon.

Do oni elŝipen forĵetis la grandan fiŝkaptilon, kaj du ŝipanoj antaŭe, du aliaj malantaŭe, komencis disvolvi sur la bobenegoj la ŝnuregojn, kiuj tenis ĝin. Subite ĝi tuŝis la fundon, kiam alta ondo klinis la ŝipon. Tiam la duenaskita Kloro, kiu troviĝis ĉe la pruo, kaj stiris la malsupreniron de la retego, ŝanceliĝis, kaj lia brako ekkaptiĝis inter la ŝnuroj, kiu estis dum momenteto malstreĉa pro la skuo, kaj la ŝnuro glitis sur la ligno. Li malespere strebis por liberigi sian brakon, provante per la alia mano levi la ŝnuron, sed jam la trolo rastis la fundon, kaj la rigidigita ŝnurego tute ne cedis.

La viro kuntiriĝanta pro la doloro alvokis. Ĉiuj alkuris. Lia frato forlasis la direktilon. Ili impetis kaj tuj ekkaptis la ŝnuron, klopodante por liberigi la membron, kiun dispremis la ŝnuro. Sed estis vana peno. « Endas tranĉi », diris ŝipano, kaj li eltiris el sia poŝo larĝan tranĉilon, kiu povis, per du frapoj, savi la brakon de la duenaskita Kloro.



Sed tranĉi estis ankaŭ perdi la trolon, kaj tiu trolo multvaloris, eĉ multege altvaloris, mil kvin cent frankojn; kaj ĝi apartenis al la unuenaskita Kloro, kiu tre domaĝis sian havaĵon.

Li kriis, kun disŝirita koro : « Ne, ne tranĉu, atendu, mi tuj lofos. » Kaj li kuris al la stirilo, por ekŝanĝi tute la direkton.

La ŝipo apenaŭ obeis, tiom ĝi estis bridata per tiu retego, kiu malhelpis ĝian ekantaŭiron, kaj kuntrenata cetere de la forteco de la tajdo kaj la vento.

La duenaskita Kloro lasis sin fali genuen, kunpremante la dentojn, kun la okuloj

senrigardantaj. Li nenion diris. Lia frato revenis, timante ĉiam tranĉilfrapon de maristo : « Atendu, atendu, ne tranĉu, endas ankri. »

Oni ĵetis la ankron, kaj disvolvis plene la ĉenon, poste oni ekĝiris per la vinĉo por malstreĉi la trolŝnurojn. Fine, tiuj ĉi malrigidiĝis iomete, kaj oni liberigis la inertan brakon de la maniko el lano sange makulita.

La duenaskita Kloro ŝajnis idiota. Oni demetis al li la laborjakon, kaj oni vidis hororan aĵon, kaĉon de karnoj, kies sango abunde elŝpruĉis, kiel se ĝi estus repuŝata per pumpilo. Tiam la viro rigardis sian brakon, kaj murmuris : « Kondamnita ! »

Poste, ĉar la hemoragio faris flakon da sango sur la ferdeko, unu el la ŝipanoj kriis : « Li tuj malpleniĝos, endas stringi la arterion. »

Tiam ili ekprenis ŝnureton, brunan gudritan dikan ŝnureton, kaj cirkaŭligante la membron super la vundo, ili plenforte streĉe ligis. Iom post iom la sangaj ŝpruĉoj ĉesis, kaj baldaŭ finiĝis komplete.

La duenaskita Kloro stariĝis, kun brako pendanta ĉe sia flanko. Li ekprenis ĝin per la alia mano, levis ĝin, turnis ĝin, skuis ĝin. Ĉio estis rompita, la ostoj frakasitaj; nur la muskoloj retenis tiun fragmenton de sia korpo. Meditante, li rigardis ĝin per malĝoja okulo. Poste li sidiĝis sur falditan velon, kaj liaj kamaradoj konsilis al li, ke li senĉese malsekigu la vundon, por preventi *la nigran malsanon*.

Oni metis plensitelon da akvo apud lin, kaj minuto post minuto, li ene elĉerpis akvonper glaso, kaj banis la hororan vundon, per flueto de klara akvo.

– *Vi estus pli bone malsupre*, lia frato diris al li. Li malsupreniris, sed post unu horo li resupreniris, ĉar li sin sentis tute sola kaj malkomforta. Kaj poste, li preferis plenaere resti. Li denove sidiĝis sur sian velon, kaj rekomencis akvumeti sian brakon.

Ili havis bonan rikolton de fiŝkaptajtoj. La larĝaj fiŝoj kun blanka ventro kuŝis apud li,

skuataj per mortspasmoj; li rigardis ilin, ne ĉesante malsekigi siajn dispremitajn karnojn.

Dum oni sin pretigis reveni al Bulonjo, nova ventekblovo furiozis; kaj la ŝipeto rekomencis sian frenezan veturadon, saltigante kaj rulfalante, skuante la kompatindan vunditon.

Eknoktis. La ŝtormo daŭris ĝis la aŭroro. Ĉe la sunleviĝo, oni ekvidis denove Anglion, sed ĉar la maro estis pli kvietaj, boardante oni reforiris al Francio.

Ĉirkaŭ la vespero, la duenaskita Kloro alvokis siajn kamaradojn kaj montris al ili nigrajn spurojn, tute malbelan ŝajnon de putrado sur la membroparto, kiu ne plu tenis al li.

La ŝipanoj pririgardis, dirante sian opinion.

– Tio ja povus esti la Nigro, pensis ŝipano.

– *Supre tio, necesus sala akvo*, deklaris alia ŝipano.

Do oni alportis salan akvon, kaj oni verŝis ĝin sur *la malbonon*. La vundito fariĝis livida, grincigis la dentojn, iom tordiĝis, sed li ne kriis.

Poste, kiam la brulvundo mildiĝis: « Donu al mi vian tranĉilon », li diris al sia frato. La frato prezentis sian tranĉilon.

– Tenu al mi la brakon supren, tute rekte, kaj bone tiru ĝin.

Oni faris kion li petis.

Tiam li mem ektranĉis. Li tranĉis delikate, pripensante, tranĉante la lastajn tendenojn per tiu klingo akra, same kiel la tranĉrando de razilo; kaj baldaŭ li nur havis stumpon. Li eligis profundan suspiron, kaj deklaris: «Tio estis necesa. Mi estis kondamnita.»

Li ŝajnis mildiĝinta kaj forte spiris. Li rekomencis verŝi akvon sur la membroparton, kiu restis al li.

Dum la nokto la vetero estis ankoraŭ aĉa, kaj oni ne povis surteriĝi.

